



Kjære lesar

Denne gongen har vi ei melding frå den livlige avskjeds-konserten til Esperanto Desperado. So kan du lesa om eit spanande prosjekt som strekkjer seg utanfor Esperantios grenser. Til slutt kan du laga kake med ei oppskrift som garanterer deg suksess i selskapslivet.

God lesnad! Og god apetitt.

Leif Arne Storset
Redaktør



inter ni dirite

- LA JUNULARA FORUMO

Redaktis: Leif Arne Storset

Adiaŭ al Esperanto Desperado

Mardon, la 2an de aŭgusto ĉi-jare, mi renkontis Esperanto Desperado por la unua fojo – kaj la lasta. «Espo-Despo», multjara fenomeno en kaj ekster Esperantio, diris sian adiaŭon al la Esperanta publiko dum viglega koncerto ĉe IJK 2005.



Amir Hadžiahmetović sur la scenejo dum IJK. Fotis: LAS.

Se vi ial ne almenaŭ aŭdis la nomon Esperanto Desperado, ili estis dan-pol-bosnia muzikistgrupo kiu formiĝis en 1993 kiel «Brokantaĵo». Dum la 5 ĝis 6 lastaj jaroj ili multe koncertis kaj en Esperantio kaj ekstere, kaj eldonis la KDjn Jen venas... en 2000 kaj Hotel Desperado en 2004.

La bando regas imponan spektron de muzikaj ĝenroj. Frue en la koncerto ili kantis pri la «Ska-virino» (kompreneble per ska), kun kiu la kantisto dancis «ĝis la nokto, noktofin». Tiu tre vigla kanzono logis eĉ norvegon al la danclanko! Ili donacis al ni ravantajn tonojn de la regiono de muzikisto Amir Hadžiahmetovic. Kaj oni malofte

audas muzikistojn kiuj flirtas kun la helaj kaj gajaj hi-life-tonoj de la okcidenta Afriko.

Dum la tuto sckvas nin la esprimoplana akordiono de Kim J. Henriksen kaj la plummalpezaj flutimprovizaĵoj de Helle Eble Cleary. Nis Bramsen kaj Mark Dziwornu donis al ni solidan kaj vigan tamburfundamenton, kaj belsonan basakompanion Brian Laustsen.

La marda vespero estis vere plena de esperantistaj steloj kiam kanzonisto JoMo (Jean-Marc Leclercq) venis surscenejen. Li estas ankoraŭ pli lerta pri fari scenspektaklon, kaj kune kun Espo-Despo li sukcesis levi la etoson je ankoraŭ unu nivelo.

Kompreneble inspiris min la koncerto kaj mi tuj aĉetis du el iliaj KDj. La KDj estas bone aŭskultindaj, malgraŭ ke Espo-Despo



Kim J. Henriksen traktas sian akordionon. Fotis: Ulf Lunde

«Ni dankas al ĉiuj kiuj apogis nin dum la jaroj... kio okazos poste? Venu, vidu kaj vicu... ☺»

unuavice estis sceneja bando. Kion fari do se vi ne aŭskultis ilin ankoraŭ, kaj la bando estas disiĝinta? Vi povas nur esperi – kaj la retpaĝoj permesas al vi la esperon vivi. Ili skribas ke la bando verŝajne neniam konsistos el samaj membroj, kaj



Norvega partoprenanto en IJK, Kjetil Hansen Ree, kaj la verkinto, Leif Arne Storset, en Internacia Balo dum IJK. Fotis: LAS.

Legu pli je:

<http://www.esperantodesperado.dk>

<http://www.esperanto.no/muzik/#pop>

Aliaj fontoj:

Libera folio 2005-09-22

Esperanto-nytt 2-2005

Leif Arne Storset

VORTLISTO

brokantaĵo – ordspel på brokanta og kantaĵo; kan tyda noko som «gjenbrakte songar»

logi – lokka

ravi – henrykke

okcidenta – aust-esprimoplana – uttrykksfull

akordiono – trekkspel

plummalpeza – fjærlett

flutilo – fløyte

tamburo – tromme

kanzonisto – visesongar

KD aŭ k-disko – CD

Projekto Interkulturo: por bezono kaj plezuro

La lingvo Esperanto ebligas interŝanĝon de interkulturaj scioj kaj spertoj – sed ĉu tio okazas sufiĉe? Projekto Interkulturo celas fari fakton el teorio. Rakontas al ni pli Radojica Petrović, prezidanto de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) kaj kunordiganto de la projekto.

«Komence Interkulturo (IK) estis alloga por mi ĉar ĝi kreis vastajn eblecojn por praktika utiligado de Esperanto», diras Petrović, kiu nun laboras en la TEJO / ILEI-teamo de IK. «Poste ĝi fariĝis tereno por mia profesia esplorkonlaboro en la universitato rilate al aplikado de inform-komunikaj teknologioj en edukado.»

Petrović eklaboris per IK en la jaro 1999, kaj estiĝis kunordiganto en 2004. ILEI lanĉis la projekton Interkulturo en la jaro 1998, sed la aktiveco komencis ankoraŭ pli frue.

«La inspiro venis de la projekto Linguapax, kiu ekestis kaj realiĝis en la rondoj de Unesko», rakontas Petrović. «Linguapax celis interkulturan edukadon per lingvoinstruado. Interkulturo celas la samon per Esperanto.»

Por realigi siajn celojn kaj ideojn pri kultura interŝanĝo, Interkulturo uzas metodikon kiu konsistas el kvar punktoj:

- *Fono* pri la rolo de interkultura lernado en la ĝenerala situacio en la mondo.
- *Metodoj* per kiuj IK-grupo povas preni

por realigi laŭeble interesan, sukcesan kaj profundan interkulturan komunikadon kaj interŝanĝon kun alia grupo.

- *Ekzercoj* por helpi la tutan interŝanĝan procezon, kiujn eblas uzi ekster la Interreto en unuopaj IK-grupoj, kaj per la Interreto inter diversaj IK-grupoj.
- *Taskoj* por instigi intergrupan kunlaboron dum solvado de diversaj taskoj kun konkretaj rezultoj.

Kompreneble, IK estas farata por grupoj de lernemuloj kun gvidanto. Petrović fakte mem komencis sian projektpartoprenon kiel gvidanto.

«Mi aktiviĝis por Interkulturo en la jaro 1999 kiel gvidanto de IK-grupo en Ĉaĉak kaj organizanto de somera lernejo 'Interkulturo' en Serbio», li diras. Nun preskaŭ 20 junulaj grupoj partoprenas, kaj Petrović kontentas pri la unuaj reagoj:

«Ĝis nun ni realigis gravan paŝon de la projekto – transnacion kontaktreton de Interkulturo, kiun subvencias ESF (Esperantic Studies Foundation) el Usono kaj la EU-fondaĵo YOUTH», klarigas li.

«La ideoj de IK rapide fariĝis popularaj kaj tiu populareco daŭras en kaj ekster Esperantujo. Ĉe <http://www.interkulturo.net/vikio/?title=Prezentoj> legeblas interesaj materialoj pri diversaj interkulturaj temoj kiujn verkis IK-partoprenantoj el diversaj mondopartoj.»



Radojica
Petrović

Sed ankoraŭ restas iom ĝis la idealoj estos atingitaj.

«Tamen praktika utiligado de IK ankoraŭ estas sub la nivelo de niaj atendoj,» rimarkas Petrović.

Eble helpos planoj pri nova IK-paĝaro plurlingva, trejnado de IK-instruistoj kaj novaj subvencioj por IK. Petrović havas ĉi tion por diri al interesigantoj pri IK:

«Utiligu Esperanton por viaj bezonoj kaj via plezuro. Se vi interesigas pri interkultura edukado kaj lernado, vi ĉiam trovos lokon por vi en IK.»

Fonto: <http://www.interkulturo.net>

Vidu ankaŭ: <http://www.interkulturo.net/vikio/?title=Prezentoj>

Leif Arne Storset

VORTLISTO

alloga – lokkande
tereno – terreng
aplikado – bruk
lanĉi – lansera
celi – ha som mål
fono – bakgrunn

Brownies

Ĉi tiun recepton por brunaj kuketoj ricevis mia kalifornia avino antaŭ pli ol duona jarcento, kondiĉe ke ŝi gardos ĝin kiel gravan sekreton. Mia avino poste donis ĝin al ĉiuj konatinoj. Eble tio klarigas la nuntempan popularecon de Brownies?

Ĉiu-okaze: ĉi-sube estas la tre simpla recepto, kun originala noto de mia avino. Kun ĝi mi garantias al vi sukceson en la festena vivo!

100 g kuirĉokolado

100 g butero

3 ovoj

3,5-4 dl sukero

2,5 dl faruno

1 tk salo

Vanilo (aŭ vanilsukero)

Migdaloj aŭ aveloj

Haku la nuksojn. Miksu ĉion. Baku je 180° C dum 30 min. Por ŝpari fluon, malŝaltu la bakfornon kvin minutojn antaŭ la fino.

Leif Arne Storset



Mmmmm!

VORTLISTO

faruno – mjøl
tk (tekulero) – teskei
migdalo – mandel
avelo – hasselnøtt
bakforno – steikeomn
kondiĉe ke – på vilkår av at
gardi – vokta
ĉiuj konatinoj – alle veninnene